6-a Jaro. N-o 289 APERAS  SEMAJNE Leipzig, 17./4. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

LA HOMO KAJ LA MAŜINO


Strangaj diskutadoj persiste daŭras en nia epoko inter amikoj k kontraŭuloj de la maŝino. Oni kredas revi: ĉu do ekzistas homoj, kiuj kontraŭstaras al la teknika progreso, al la aplikado de ilaro pli k pli perfektigata, al la pliiĝo de l' homa povo en la luktado kontraŭ la naturo? Ĉu necesas defendi la maŝinon?

Antaŭ unu jarcento, proletaro pelita en malesperon, ankoraŭ nekonscia pri sia historia misio, fordonis sin al agoj de vandalismo kontraŭ la unuaj maŝinoj. La tempoj ŝanĝiĝis, Karlo Marks mem instruis al la laborista movado, ke la vojo al ĝia liberiĝo devas pasi tra la pli k pli giganta disvolviĝo de l' produkto fortoj.

Oni renkontas hodiaŭ la reziston kontraŭ la maŝinismo nur en postrestintaj landoj, kie laborista klaso naskiĝanta klopodas por la unua fojo, per primitivaj metodoj, ekfari batalojn kontraŭ la fortoj, kiuj ĝin premegas, k en Eŭropo, ĉe iuj tielnomataj revoluciaj sektoj, kiuj inspiriĝas, en sia batalo, per principoj perdintaj sian ekzistorajton.

Tiel la ĉiniaj kulioj, minacataj en sia ekzisto per la modernaj transportiloj, ekkomencis, en pasinta oktobro, amasan atakon kontraŭ la Pekinaj tramvojoj.

"De la unuaj vesperaj horoj de l' 23. oktobro, skribis la ĵurnaloj, dudek mil *rikŝoj*[1], kiuj plenigas la stratojn de l' ĉefurbo, malaperis el la trafiko, kiel laŭ la ekfrapo de magia bastoneto. Ioman tempon poste, fortaj hordoj el kulioj atakis samtempe la tramvojon en pluraj kvartaloj, k deviginte la vojaĝantojn forlasi la veturilojn, frakasis ilin en mil pecojn. La polico, senpova, ne povis interveni k oni devis alvoki la soldataron kazernigitan en la ĉirkaŭo de l' urbo. Ĉi tiu povis restarigi la ordon dum la paso de l' nokto.



Desegno de Marco Eilfa.

"La tramvoja kompanio perdis preskaŭ sian tutan materialon en funkciado troviĝantan. La ekonomiaj malfaciloj, kiuj furiozas nuntempe en norda Ĉinio, kontraŭmetiĝas al la restarigo de l' trafiko."

En Ĉinio tiaj agoj kompreniĝas facile. La laborista klaso de tiu vasta imperio devas ankoraŭ lerni, ke la socialismo povas estiĝi nur el potence disvolvita industria civilizo, k ke nova sociordo estas neeble konstruebla per brak-ĉaretoj k ventmueliloj.

Tial la demando: por aŭ kontraŭ la maŝino? ne povas mem metiĝi por adepto de l' scienca socialismo. Kaj oni devas nenion scii pri la laborista movado, ĝiaj celoj k aspiroj, por esti tentata defendi la maŝinon kontraŭ la supozita socialista vandalismo.

La maŝino "per si mem" estas nek bona nek malbona. Ĝi entenas samtempe ĉiujn virtojn k ĉiujn malvirtojn: laŭ la strukturo de l' socio, kiu ĝin aplikas, ĝi povas esti liberigilo aŭ plago por la homaro.

Kion kondamnas la scienca socialismo, tio ne estas la maŝino, sed la *kapitalista uzo de l' maŝino.* Kion ĝi postulas, tio ne estas la ekstermo al la maŝinoj, sed ilia utiligo ĉe la organizita socio profite je la kolektivo.

Hodiaŭ, la maŝino funkcianta kiel kapitalo, praktikas sian diktaturon sur la laborulan homaron. Aplikata por pligrandigi la profiton k ne por pliigi la bonstaton de l' amaso, ĝi ĵetas la laboristojn en la senlaborecon, plimalvalorigas ilian kvalifikon k malaltigas la salajron rilate al la profito. La usonaj statistikoj liveras pri tio elokventan ateston. El tirano, la socialismo intencas transformi la maŝinon en sklavon. Ĝi volas, ke la malpliiĝo de l' homa penado, realigata per la mekanika forto, servu por pliigi la bonstaton de ĉiuj, k ne por pligrandigi la profitojn de malplimulto el plutokratoj.

La maŝino k la socialismo

Estas fakto, pri kiu oni ne povus tro insisti por evidentigi la superecon de l' socialismo super la ekzistanta ordo: la plivastigita eblo apliki maŝin-

[1] Duradaj veturiletoj, kiujn trenas la kulioj.

ojn k limigi la homan penadon per la mekanika forto.

Malgranda kalkulo, por ĉiuj konceptebla, permesos kompreni, ke iuj multekostaj maŝinoj, kies desegnoj hodiaŭ estas forkaŝitaj en la tirkestoj de malsatantaj inventintoj, estus plene profitigaj en socialisma ekonomio. Certe, ni scias, ke la moderna kapitalismo, kies "putriĝon" jam proklamas iuj devojigitaj cerboj, disvolvas hodiaŭ pli ol iam la produktofortojn. Sed ni intencas demonstri, ke socialisma socio estus kapabla disvolvi ilin multe pli rapide ankoraŭ.

Estas evidente, ke maŝino povas utili nur, se ĝi mallongigas la tempon necesan por la fabrikado de objekto. Neniu konsentus anstataŭi malmultekostan ilon per malsimpla maŝino, se la necesa tempo por produkti iun aĵon, aŭ la produktokosto troviĝus per tio plialtigitaj. En iuj specialaj kazoj, kiam temas pri escepte penigaj aŭ naŭzaj laboroj, socialisma socio enkondukus sendube maŝinojn, eĉ kiam ilia aplikado ne pruviĝus profitiga. Sed laŭ ĝenerala regulo, la eblo utiligi novan maŝinon dependas de l' ŝparo, kiun ĝi realigas.

Ni supozu, ke la fabrikado de ilo necesigas 100 laborhorojn k ke ĝia rezistoforto permesas produkti per ĝi 25 objektojn, antaŭ ol ĝi estos eluzita k devos esti anstataŭata per alia. Por fabriki unu el tiuj 25 objektoj, necesas labori 36 horojn per nia ilo. La labortempo postulata por la produktado de l' objekto estos do 36 horoj plus 4 horoj (dudek-kvinono de l' tempo, kiun bezonas la fabrikado de l' ilo).

Maŝino anstataŭanta la ilon ebligus limigi la labortempon de 36 ĝis 24 horoj. Ĉu la maŝino estos utila? Ĝi ŝparas 12 laborhorojn; sed se ĝia konstruo kostas pli ol ĝi ŝparas, neniu ĝin utiligos. Supozu ni, ke ĝia konstruo necesigas 1000 horojn k ĝi povas produkti 50 objektojn, antaŭ ol fariĝi rubaĵo. La labortempo postulata por la produktado de objekto estos do 24 horoj plus 20 horoj (kvindekono de l' tempo, kiun bezonas la konstruo de l' maŝino). En tiu kazo, la socio, tute ne profitante ĉe tiu procedo, perdus male je tio. Ĝi elspezus 40 laborhorojn utiligante simplan ilon, k 44 horojn utiligante la maŝinon.

Ni supozu nun, ke la teknika progreso realigas novajn miraklojn k ke ĝi ebligas, ĉu produkti la saman maŝinon dum 500 horoj, ĉu ĝin igi pli rezistokapabla, tiel ke ĝi povus fabriki 100 objektojn anstataŭ 50 antaŭ ol esti komplete eluzita. Ĉar temas pri la sama maŝino, necesas ĉiam 24 laborhoroj por fabriki la koncernan objekton. Sed se la konstruo de l' maŝino necesigas nur 500 horojn anstataŭ 1000, aŭ se la maŝino povas fabriki duoble pli da objektoj antaŭ ol esti ne plu uzebla, ĝia parto en la produktokosto malpliiĝos je l' duono. Tiam la tuta laboro necesa por la produktado de objekto estos 24 horoj plus 10 horoj, t. e. 34 horoj. La produktado de l' sama objekto per la ilo necesigis 40 horojn: la maŝino estas avantaĝa, ĉar ĝi ŝparas laboron.

Tamen, nia ekzemplo validas nur por socio ne konanta la profiton. En socialisma socio oni kalkulos la penadon rekte, laŭ la laborhoroj.

En la nuntempa socio, kie ĉio determiniĝas laŭ kuranta mono, k kie la profito regas la produktadon, la eblo enkonduki maŝinojn anstataŭe je simplaj iloj, k perfektigitajn maŝinojn anstataŭ pli primitivaj, estas tenita en pli malvastaj limoj.

Se ni reprenas nian unuan ekzemplon, aplikante ĝin ĉi-foje, al socio regata de l' profito, ni ricevos aliajn rezultojn.

Ni havis, por la fabrikado de objekto helpe de ilo, labortempon de 40 horoj (4 horoj por produkti la ilon k 36 horoj por labori per ĉi tiu ilo). Sed en la kapitalisma socio, la laboristo ricevas, sub formo de salajro, nur parton de la valoro, kiun li kreas. Li laboras 36 horojn, sed li akiras por sia laboro nur sumon samvaloran, ekzemple, al 18 horoj. La alia duono konsistigas la kapitalistan plusvaloron.

En tiu ĉi kazo, la mastro starigos sian produktokoston, laŭ unuopa fabrikaĵo, jene: 4 dolaroj (supozite, ke unu laborhoro egalas unu dolaron) por la ilo, k 18 dolaroj je salajro[1], t. e. 22 dolaroj. Oni proponas al li aĉeti la maŝinon, k li komencas kalkuli la novan produktokoston: 10 dolaroj por la maŝino k 12 dolaroj je salajro (se la laboristo devas labori 24 horojn, li akiras kiel salajron, laŭ nia supozo, la duonon de l' valoro, kiun li kreas), t. e. 22 dolaroj. La maŝino ne ebligas iun avantaĝon: la produktokosto estas la sama kiel per la ilo.

Ni supozu, ke la salajroj estas je ekstreme malalta nivelo: la laboristo akiras nur trionon de l' valoro, kiun li kreas, k la du aliaj trionoj falas en la mastran monŝrankon. La produktokosto prezentiĝus tiam jene: per la ilo: 4 dolaroj (ilo) plus 12 dolaroj (salajro) = 16 dolaroj; per la maŝino: 10 dolaroj (maŝino) plus 8 dolaroj (salajro) = 18 dolaroj. La mastro ne enkondukos la maŝinon, ĉar ĝi estus pli multekosta ol la ilo. En socialisma socio, tiel kiel ni vidis, la sama maŝino estus aplikebla; ĝi ne estas tia en kapitalisma reĝimo. Ĝi estas profitiga por la socio; ĝi ne estas tia por la kapitalo.

Ni supozu, fine, ke la salajroj estas tre altaj: la laboristo akiras du trionojn de l' valoro, kiun li kreas. Tiam la produktokosto estus per la ilo: 4 dolaroj (ilo) plus 24 dolaroj (salajro) = 28 dolaroj; per la maŝino: 10 dolaroj (maŝino) plus 16 dolaroj (salajro) = 26 dolaroj. Ĉi-foje la maŝino pruviĝas avantaĝa eĉ en kapitalisma reĝimo. Sed ĝi estas avantaĝa nur, ĉar la salajroj estas tre altaj.

Rezultas el tio, ke la laborista batalo por la plialtigo de l' salajroj k por la malpliigo de l' laborhoroj estas la plej potenca stimulilo de l' teknika progreso. Ju pli malaltaj la salajroj, des pli limiĝas la agolibero permesanta la enkondukon k la perfektigon de maŝinoj. Ju pli altaj estas la salajroj, des pli larĝiĝas la ebloj de l' teknika progreso.

Tiel oni povas kompreni, ke eĉ la plej modesta agado de l' laboristaj sindikatoj por la plibonigo de l' ekzist- k labor-kondiĉoj de l' salajruloj, havas nekompareblan gravon por la progreso k por la suprenleviĝo de l' homaro, por la disvolviĝo de l' produktofortoj, ĉar ĝi puŝas al la plibonigo k disvolvo de l' maŝinismo.

Kio kunhelpis fari el Usono industrian potencon senkomparan, tio estas en granda mezuro la relativa alta nivelo de l' usonaj salajroj.

Pri tiu temo diris Karlo Marks jenon:

"Antaŭ la malpermeso de l' laboro por virinoj k malpli ol 10-jaraĝaj infanoj en la minejoj, la kapitalo opiniis, ke la okupo de virinoj k knabinoj tute nudaj, kunage kun viroj en la karbaj k aliaj minejoj, kongruas absolute kun la moralo k precipe kun ĝia kaslibro; tial nur post tiu ĉi malpermeso ĝi aplikis la maŝinaron. La usonanoj inventis maŝinojn por rompi la ŝtonojn. La angloj ne uzas ilin, ĉar la "mizerulo" (tio estas la moknomo, kiun la politika ekonomio angla donas al la terkultura laboristo), kiu faras tiun ĉi laboron, estas tiom malmulte salajrata, ke la instalo de maŝinoj plialtigus por la kapitalisto la produktelspezon. En Anglio, oni okupas iafoje ankoraŭ virinojn anstataŭ ĉevaloj por la ŝiptrenado, ĉar la laboro

[1] Ni ne konsideras la koston de l' krudmaterialo k akcesoraĵoj, kies valoro, konsiderata kiel konstanta, nur konfuzus la kalkulon, ne modifante ĝin.

Proletaria Kantaro

La elekto de la kantoj, ilia proleta tendenco, ilia internacia valoro, la fakto, ke ĉiu povas studi kaj kanti ilin dank' al la muziknotoj zorge presitaj, faras el tiu volumo unikan verkon, kiaspeca ne ekzistas ĝis nun en iu nacia lingvo.

Prezo: 2,50 mk. g.


Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

postulata por la produktado de ĉevaloj k de maŝinoj estas matematike fiksita kvanto, dume la laboro necesa por la konservado de tiuj ĉi virinoj ne estas konsiderinda[1].“

La scienca socialismo havas nur indulgan rideton por la malbenoj de tiuj, kiuj ne komprenante ĝin, provas ĝin prezenti kiel malamikon de l' teknika progreso k kiel kontraŭulon al la maŝinismo. Tiuj ĉi atakoj ne malhelpas ĝin batali senlace por la estonto de mondo, kie la ebloj anstataŭi per la mekanika forto la homan energion estos pli vastaj ol iam, dank' al la venko de l' homaro super la maŝino, transformita el tirano en sklavon.

Lucien Lora.

[1] La Kapitalo, I. libro, ĉapitro XIII/II.



KANADO — LANDO DE ORA OPORTUNO

Kiel ĉiuj scias, en Anglio depost la militfino, estas konstanta senlaborularmeo, kiu ĉiam superis milionon: nuntempe ĝi eĉ superas du milionojn. Oni proponis multe da planoj por forigi la senlaborecon, kiel ekzemple “Imperian Komerc-preferon“, import-impostojn pli altajn, konstruadon de novaj vojoj, landreakiron for de la maro, elmigradon, ktp. — fakte ĉion escepte socian mastrumadon. Por pliviglìgi la elmigradon al imperio-partoj, la registaro helpas per malkarigita vojaĝkosto. Normale la vojaĝo al Kanado kostas 25 funtojn sterlingajn (ĉ. 125 dol.), sed per registara helpo nur 2 funtojn (ĉ. 10 dol.).

De kiam komenciĝis la elmigrado helpata de l' registaro, aŭdiĝas ĉiamaj plendoj k averto de la Kanada (k alilandaj) sindikatoj, ke la enmigrantoj “elsaltas el la fritilo en la fajron“ — alivorte, ke ili iras el unu malbono en alian. Oni avertas, ke en Kanado ankaŭ estas multe da senlaboruloj, ke la enmigrantoj estas uzataj por malaltigi la kanadanajn salajrojn.

Jena artikolo el “Ĉiutaga Laboristo“ (*Daily Worker*) montras la staton en Kanado:

“Ket Liz (Kate Lees) alvenis Kanadon plena je fido pri la lando, en kiu oni ĝojplene vivos, se oni “nur havas emon por labori“. Ŝi ricevis per registar-oficejo postenon sur Ontaria farmo kontraŭ salajro el 8 dolaroj monate k senpagaj loĝejo k manĝo. Ŝia dunginto estis “bonhumora“ viro, kiu ĉiam ĝojis povi “helpi al brito“. Ŝi laboris por tiu ĉi mastro dum preskaŭ 12 jaroj k neniam ricevis eĉ unu moneron.

“Fine, post la forpaso de sia juneco en ĉi tiu sklaveco, je la konsilo de alia farmlaboristo ŝi ekprocesis por havigi al si la tutan monsumon ŝuldatan. La defenda juĝisto argumentis, ke pro la avantaĝo, kiun ŝi havis loĝi kun tiaj superaj k bonedukitaj personoj kiel la farmmastro k liaj samfamilianoj, ŝi sufiĉe bone estis salajrata per senpaga loĝado, k estas malĝentile, maldanke k vulgare, ke ŝi eĉ mencias pri mono.

La juĝisto verdiktis al ŝi 690 dolarojn, por ŝia preskaŭ 12-jara sklaveco.“

L. B., Leeds.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA “LA LERNANTO“



EL USONA TAGLIBRO

Marto

Industrio moviĝas suden por trafi pli malkaran laborforton. Tie policanoj povas pafi sentime la strikantojn. Sed eĉ la policanoj komencas protesti. Unu estro (*Sherif J. M. Morland*) en Ilizebetn (*Elisabethton*), ŝtato Tenisi (Tennesse), rezignis, ĉar li ne volis mortpafi laŭ ordono de l' mastroj. En Filadelfio 50 mil homoj publike ĵuris per suprenlevita brako k senĉapa kapo daŭrigi la batalon kontraŭ malaltan salajron k maljuston, kiam ili funebris pro strikinto mortigita de strikrompanto.

* * *

Ankoraŭ la Senato plialtigas impostojn. Ĉiu interesosfero volas havi plian protekton. Nur H. Ford proponis nuligi la imposton por aŭtoj. Kritiko amasiĝas kontraŭ Huver (Hoover). Antaŭ unu jaro ĉiu laŭdis la “inĝenieron“. Nun li silentas pri “prohibicio“, pri impostoj, pri malarmado, k liaj subtenintoj ribelas. Grandaj afiŝoj “Nenio povas haltigi Usonon“ (*Nothing can stop U. S.*) sur la placoj, konferencoj kun la industriestroj ktp. ne malebligas la kreskadon de senlaboreco minimume nun je 3 milionoj. Kiam la senlaboruloj manifestaciis, ĉefe sub la gvido de la K. P., 1400 el ili estis arestataj k multajn la policanoj furioze atakis dum la 6-a de marto.

* * *

Skismo okazas en la karbminista sindikato k ŝajne reorganizita progresema sindikato pli bone defendos la karbministojn nun minacatajn de la maŝino k laborantaj pli danĝere ol en iu alia moderna lando. La centro de la forto de l' nova *U. M. W.* estas en Ilinoj (Illinois), kie la karbministoj pli forte organiziĝis. La nova sindikato duonigis la salajron de sia estro ĝis 6000 dolaroj k postulas karbminejan laborsemajnon de 30 horoj. Malgranda komunista karbsindikato atakas tiel la novan kiel la malnovan.

* * *

Hipokrito la ŝoviniston ĉiam distingas. Ekzemple la usonanoj en Hajti (Haiti) fanfaronas pri la konstruado de 1200 kilometroj da aŭtovojoj, sed forgesas pri la malliberigo al la insulanoj, kiuj batalas por memrego. (Ŝajne Usono pli malkaŝe k ekonomie nun devas regi tie k forsendi hejmen la usonajn soldatojn.) La britoj simile alte estimas sian propran laboron en Hindio rilate al sinofero de vidvino ĉe edzo-funebro (*suttee*), rilate al higieno, administrado ktp. Sed ili ankaŭ forgesas pri la kosto de la armeo k la administrado, kiun pagas la hindo. Ĉiam la ŝovinisto opinias, ke li estas ia Mesio ĉiela, kvankam li nescias multe. Ekzemple dum malsato en Ĉinio iu usona firmo sendis skatolojn de “maĉgumo“ (multe uzata en Usono) al la viktimoj. La ĉinoj, neniam antaŭe vidintaj tian bombonon, formanĝis k poste unike suferis pro maldigesto k malsato samtempe!

488.



Rezulto de ĝenerala elektado en Japanio

La 20-an de feb. okazis la ĝenerala elektado por parlamento en Japanio. La registaro, kiu sukcesis reenkonduki oran vivnormon en japana ekonomio penante stabiligi burĝaron je la kosto de l' proletaro, disigis la antaŭan parlamenton pro malmulto da parlamentanoj en la propra partio: “Minsei-to“.

La rezulto estas: Minsei-to (registara partio) — 273, Seiju-kai (burĝa opozicio) — 173, neŭtralaj partioj — 9, proletaj — 5.

La registaro, apogante sin sur financkapitalistoj, triumfis akirante absolutan plimulton. Ĝi povis plenumi sian politikon raciigi kapitaliste la japanan ekonomion oferinte vivon de proletoj.

Kompare kun la antaŭa nombro, socialdemokrataj partioj perdis du deputitojn, sed la voĉnombro akirita ĉi foje plimultiĝis je 30 mil. Kiel kaŭzon de tia perdo, ni citas mal-unuecon ĉe proletaj partioj; nome, *Ŝakai-minŝu-to* (dekstra socialdemokrata), *Nihon-taiŝu-to, Roo-noo-to* (maldestraj socialdemokrataj) k aliaj lokaj partioj batalis en sama fronto; kun nenia interkonsiliĝo pro sia sektismo, ili perdis okazojn elektiĝi, k nun, post balotado,

ili parolas pri l' urĝa bezono unuigi la partiojn sub unueca fronto, sed estas dubinde, kiomgrade ili povos forskui de si la ĝisnunan sektecon. Due estas rimarkinde, ke la dekstra socialdemokrata partio ne sukcesis tiom, kiom antaŭe; tiu fakto bone montras al ni la maldekstriĝon de l' proletaro.

Ŭada-I, Tokio.

Red. aldono. Ni enmetas tiajn sciigojn, tial ke ili venas el Oriento, rimarkigante tamen, ke oni jam delonge povis legi ilin en ĉiutagaj gazetoj. Niaj kunlaborantoj ne provu konkuri kun telegrafaj agentejoj, vi ne sukcesos. Sendu materialon, kiu povas esti ankoraŭ "aktuala" post ses monatoj.

La laboro en la silkfabrikoj (Belgio)

Pro diversaj kaŭzoj ekonomiaj, dum ĉi lastaj jaroj la silka industrio (artefarita silko) treege ampleksiĝis en Belgio. Vastaj fabrikoj mastrumas grandkvantan laboristaron. Ĝenerale la fabrikoj estis konstruataj ĉu en vilaĝo, ĉu en urbeto: Tubiz (Tubize), Obur (Obourg), Maransar (Maransart). Verdire la tuta vilaĝo, kie ekzistas tiaspeca fabriko, estas tre malbonodora. Kiam vi ne kutimas vivi en tiu loko, vi estas tute ĝenata de la eterodoro. La plej granda parto de la okupitoj estas laboristinoj. Terure ekspluatataj ili estas. Ofte ĉar ĝi estas la sola fabriko de la regiono, ili devas en ĝi akiri sian panon. La kutima salajro estas 3 frankoj hore. (Por fari komparon: bovoviando kostas 14 frankojn po duonkilogramo[1], butero 16 frankojn po duonkg., ovoj 16 fk. po dekduo). Tiu salajro estas cetere la ĝenerala salajro de la multfakaj laboristinoj en Belgio. Sed en la silka industrio tiu salajro devus almenaŭ esti duobla por permesi al la laboristinoj reagi pro sufiĉa k taŭga nutrado kontraŭ la profesiaj malsanoj. Mi nur diru, ke 17% el la laboristinoj de la silka industrio estas nerve malsanaj. Kiam okazas fulmotondro, la nombro da falantaj virinoj estas ofte alta. La fabrika malsanulejo estas tiam tro malvasta.

Alia konsekvenco de la laboro: la virinoj gravedaj, kiuj laboradas dum sia gravedeco, tre ofte abortas. La konsekvencoj estas antaŭvideblaj. Kaj se la akuŝo okazas normale, la infanoj estas ĝenerale malsanaj. Multaj gelaboristoj ankaŭ suferas je la stomako.

Sed la plej kruela fakto estas certe la seksekscito kaŭzata de la multkvanta etero uzata en la fabrikado. En iaj laborĉambroj oni povas diri, ke la laboristinoj penadas en etera nubo. Antaŭ kelkaj jaroj okazis kelkfoje skandaloj tiurilataj. La plej granda parto el la laboristinoj venante el vilaĝoj ĉirkaŭaj uzas matene k vespere la fervojon por aliri k forlasi la laborejon. Tiuj multnombraj laboristinoj devis iri al la stacidomo, k kiam la vagonaro enstaciiĝis, ili sin ĵetis grupe en la vagonojn. Malfeliĉa estis la vira vojaĝanto. Kiam la vagonaro foriris, la virinoj artifike ekscititaj atakis parole aŭ eĉ geste la kunvojaĝanton. Pro la ofteco de tiuj skandaloj la administracio decidis malpermesi al la laboristinoj la uzadon de la publika vagonaro k kreis specialan servon; la vagonaro kondukas k reprenas la laboristinojn en la fabriko mem.

Lastatempe la gazetaro proleta k eĉ burĝa komencis batalon kontraŭ tiu malinda situacio. La eksterlanda gazetaro detale priskribis la histeriajn korpostatojn de la laboristinoj (ofte la interbatalo estiĝas pro mona afero: atako al alitrustaj industriistoj). Tiu bruado devigis la Ministerion por Higienaj aferoj al speciala enketo. Estis ŝarĝita per tiu laboro iu doktoro Goossens, inspektoro en la malsanigaj industrioj. La raporto estas vere ĉefverko de la oficiala hipokrito. Unue d-ro Goossens konkludas, ke la laboro ne estas tiel malbona, ĉar laŭ lia enketo la laboro estas daŭrigita de la patrino al la filino! Li ekzamenis la tutan laboristinaron k li trovas efektive tre altan elcenton da malsanaj inter ili. Sed tuj li konkludas: — Pli ol la laboro mem certe la dancado, la nesufiĉa dormo (kvar k kvin horojn nokte), la amuz-aspiro kaŭzas tiujn malsaniĝojn. Kaj preskaŭ ĉiuj venis en tiu stato al la fabriko . . .

Stranga kontraŭdiro al la supra konkludo, diranta, ke la laboro estas transdonita de la patrino al la filino. Se tio estas fakto, ni povas kredi, ke

[1] 1 belga fk. = ĉ. 0,03 dol.

BAPTOFESTO

El "Alf", skizo de Bruno Vogel. Eldonejo: Asy-Verlag, Berlin O 34. K-do Vogel estas la aŭtoro de la libro "Vivu la milito" (germ.: "Es lebe der Krieg"). malpermesita en Germanio pro sia kontraŭmilita tendenco. "Alf" estas batalvoko kontraŭ la malhumana k kontraŭjunulara tendenco de la burĝaj instrumaniero, socio k ŝtato. Ĉi tiu libro ankaŭ estas militlibro, sed ne estas sentendenca rakontaĵo — estas konfeso k alvoko.

Same kiel multnombraj aliaj homoj, ankaŭ Feliks naskiĝis pro teknikaj mankoj de industrio, fabrikanta ĉefe varojn el Cejlona gumo.

"Fulmotondro," murmuris la patro, vidante la malgrandan fendeton. La patrino flustris: "Ho, Vilĉjo, ĉu ne okazis io!?"

Sed fakte io okazis.

Kaj ili ne trovis homon, kiu estus helpinta al ili. Tiele nun okazis, ke la urba juĝoficisto Vilhelmo Braŭn k la kudristino Maria Strubi — kiu ne nur estis "malriĉa kiel preĝeja muso" laŭ la proverbo, sed ankaŭ estis ĉeĥino — edziĝis je junia tago de l' jaro 1898 ĉe civila registrejo k ĉe la altaro en preĝejo de la urbo Dresdeno.

Ili luis duĉambran loĝejon. Mebloj estis aĉetataj partpage.

En la monato septembro naskiĝis knabo. Ĉi tiu knabo estis baptonomata Feliks. Du praonkloj k — onklinoj — parencoj de sinjoro Braŭn — estis invitataj al la baptofesto. Tamen la baptodonacoj ne konformis kun la deziroj de la familio Braŭn, k ankaŭ ne kun la riĉo de la karaj gastoj; sed tre kun ilia ŝparemo.

Noktomeze deponis praonklo la enhavon de sia stomako sur la belan sofon. Kvankam li ne faris tion pro emo je simbolaj agoj, sed sekve de stomakmalsano k tro multe da alkoholaĵoj, tamen restis malbonhumoro, k la karaj gastoj adiaŭis baldaŭ. —

Dum sinjorino Braŭn forportis la manĝilaron k pli purigis la sofon, ŝi konstatis, ke oni estus aginta pli trafe, invitante la Strubi-ajn parencojn. Tiuj verŝajne ne estus avarintaj tiele. Kaj la bela, nova sofo . . . Al la naŭzulo postpurigi la malpuraĵon! . . .

Sinjoro Braŭn konstatis aliflanke, ke li ne povis antaŭscii tion k ke ankaŭ ŝi pli frue konsentis. Kelkajn minutojn poste ekestis la unua edzeca skandalo.

Pro la ĉagreno k malespero pri la edzeca feliĉo interrompita, sinjorino Braŭn poste forgesis kontroli la temperaturon de la lakto en la ŝuĉbotelo de Feliks. Kaj Feliks tre bruligis al si la buŝeton. Denove ekflamis la disputado pri tio, kiu estas kulpa. Feliks kriegis, ne plu ĉesis krii.

La patrino balancis la korbon, en kiu kuŝis la infano k diris — se ŝi ne devis respondi al la edzo — kantsone: "huje huje — — —"

Sed per tiuj agoj la doloroj de Feliks ne malgrandiĝis. Li kriis plue.

Finfine sinjorino Braŭn kriis: "Ĉu vi nun volas silenti aŭ ne?" — k jam ŝi estis elpreninta Feliks el la korbo, metita lin sur la maldestran manon, k per la dekstra mano ŝi batis sur la nudan postaĵon. "Tiel, nun vi havas", diris sinjorino Braŭn remetante lin en la korbon. Feliks kriis plue dum longa tempo.

Ĉi tio estis la unua edukprovo por li. La multaj miloj da provoj post tiu tempo, kiujn faris kun Feliks multnombraj edukrajtigitoj, estis preskaŭ ĉiuj same sensencaj kiel la unua.

Trad. 4660.

tiuj malfeliĉaj laboristinoj estas herede malsanaj, pro la iama laboro de siaj patrinoj en la silkfabriko.

La vira laboro estas samspeca. Sed la okupado ne okazas tiel malsanige kiel en la virinaj fakoj. Nur la permaŝina laboro estas lasata al la viro. La salajro estas tre malalta. Lastjare la fabriko de Tubiz ne plu sukcesis trovi enlandan laboristaron. La viroj, pli ol la virinoj, iras labori en la apudaj (20 aŭ 30 km for de tie) industriaj centroj, en la ŝtonminejoj ktp. La direkcio petis al sia hungara filio ĉu estus eble ricevi kelkcentojn da hungaraj laboristoj. Estiĝis kolektiva kontrakto; la hungaraj laboristoj venis en Belgion, sed subskribante dujaran kontrakton. La Ministerio de l' Laboro decidis, ke la laboristoj, kiuj forlasus la laboron, estus rekondukataj al la landlimo. La mastroj profitas el tiu deviga laboro por ekspluati la laboristojn hungarajn. Ili ricevas salajron apenaŭ sufiĉantan por nutraĵoj. La loĝado estas ĝenerale mizera. La plej granda parto el tiuj laboristoj estas dikredantoj k neklaskonsciaj. Sed lastatempe iu hungara K-do, loĝanta en Bruselo, SAT-ano 10 254, faris tre bonan propagandon inter tiuj laboristoj, montrante al ili ilian klasdevon. Lia laboro trafis sukceson: la laboristaj gazetoj estas legataj. La movado kontraŭmastra komenciĝis serioze, sed . . . la belga policestro pelis el la lando nian SAT-K-don. *Léon Bergiers (630).*

Noto. En mia artikolo "Mizera situacio de la geoficistaro en Belgio" (n-o 279) mi faris eraron citante la ekzemplon de direktoro ĉe Ministerio por Internaj aferoj. La reála salajro estas multe pli alta k la alineo pri tiu fakto forstrekenda. Cetere tio ne ŝanĝas la fundon de l' artikolo, nek malpliigas la oficistan mizeron en Belgio. — *L. B. (630).*

ŬESTMINSTER[1] — LONDONO

Kiu estas la plej alloga parto de Londono?

Tio dependas de tio, kio plaĉas al vi en urbo. Por mi, kiu estis Londonano dum 20 jaroj, kiu havas emon al la bonaspekto de konstruoj, stratoj ktp., k kiu ŝatas la pitoreskon, tiu parto nomita Ŭestminster estas tre agrabla.

Ĝi kuŝas apud la rivero Tamizo (Themse), k sekve oni havas vidaĵojn, kiuj ne estas enfermitaj. Oni vidas trans la rivero, pitoreskajn tegmentojn — frapantajn siluetojn. Krepuske ĝi havas strangan ĉarmon — la nebuloj vualas la plej krudajn kapitalistajn malbelaĵojn k detalojn, k troviĝas nur misteraĵoj. Pri ĉio ĉi la pentristo Ŭistler (Whistler) verkis jene: "La vespera nebulo vestas la riverbordon per poezio, kvazaŭ per vualo, k la malriĉaj konstruoj perdiĝas en la neklara ĉielo, k la altaj kamentuboj fariĝas sonorilturoj, k la ŝarĝdomoj estas palacoj en la nokto, k la tuta urbo pendas en la ĉielo: felando ĉirkaŭas nin."

Plie, tute apude estas la parko de Sankta Jakobo k ĝardenoj de Viktoria. Belaj konstruoj estas tie, la abatejo, la parlamentejo, la "County Hall" (Konsilantara Domo) k. a. Kelkaj skulptaĵoj vidiĝas — la *Urbanoj de Kale* (Calais) de Roden (Rodin), en la ĝardenoj de Viktoria; *Abraham Linkn* (Lincoln) apud la abatejo. Rekte kontraŭ la abatejo staras la "Middlessex Guildhall" (Urbdomo de Midlseks), konstruo en la gotika stilo, por mi, kies profesio estas la arkitekturo, treege alloga. Ĝi estas la sola moderna gotika konstruo, kiun mi admiras. Se oni rigardas ĝin k poste deturnas la okulojn al la abatejo, oni tuj rimarkas, ke la abatejo ŝajnas malmola — kvazaŭ farita el fandita fero. Ne ĉio en antikv-



Londono. Parlamentejo

aj konstruoj estas admirinda: oni zorgu, ke oni ne admiru la malnovon simple pro tio, ke ĝi estas antikva. Ekzistas bonegaj modernaj verkoj arkitekturaj, kvankam elpensitaj laŭ pasinta stilo.

Por SAT-anoj, kiuj kompreneble ĉiam rigardas antaŭen al la bela nova epoko, batalante por ĝi, konstruoj modernaj estas interesaj. En Ŭestminster, tio ne troviĝas. Tamen, la kvartalo estas alimaniere alloga. Ŝarĝ-ŝipoj silente glitas sur la Tamizo, la horloĝturo "Bug Ben" leviĝas alten, k la "Plane"-arboj verde folias en la brila suno. Frumatene, kiam la suno ankoraŭ ne forpelis la nebuletojn, kiuj pendas super la rivero, k la homoj ankoraŭ ne vekiĝis, tiam la poezio proksimas. Ĉi tiu loko — la centro de la plej granda urbo en la mondo, estas grava en la historio de la homaro. Neniam antaŭe en urbo tio sama ekzistis, tia grando, tia gravo, tia riĉo.

Tia stato ne longe daŭros. Ni vidu ĝin, lernante lecionon por forigi la malbonaĵojn de granda civilizo k konservi la bonon. Venu al Londono por la SAT-Kongreso! *H. H.*

[1] Westminster.



DISKUTEJO

Ĉu fumi?

En kelkaj n-oj de "S-ulo" mi legis artikolojn pri la fumado, kiuj montris ĉiujn eblajn k neeblajn sekvojn de tiu ĉi kutimo. Kiam oni observas la homojn, oni nur povas rimarki, ke la plimulto el ili emas imiti la kutimojn de aliaj, ĉu bonaj aŭ malbonaj. Tiurilate ĉiu povas konstati ĉe si mem, ke post kelke da tempo li preskaŭ fariĝas sklavo de la kutimo, k rimarkante fine, ke ĝi malhelpas ĉu de la financa, sana aŭ progresa vidpunkto, li tre malofte ankoraŭ kapablas forpeli ĝin. Certe estas, ke la fumado ne utilas al la homa korpo, tamen oni ankaŭ povas rimarki maljunajn personojn, kiuj multe fumis dum sia vivo, k ne suferas de la sekvoj menciitaj de la tabakkontraŭuloj, inter kiuj lastaj estas ankaŭ certe multaj, kiuj iam post grava malsano estis devigitaj laŭ konsilo de la kuracisto ĉesigi la fumadon.

Tre multaj personoj volonte ĉesus fumi, sed ĝis nun ili ne sukcesis, nek legis aŭ ricevis bonajn konsilojn pri tio. Kiel fumanto, aplikante la aŭtosugeston — mi diris iam al mi: "Depost morgaŭ mi evitos la fumadon" aŭ: "Mi ĉesos fumi, kiom mi povos." Tamen dum du semajnoj mi havis ĉion por daŭrigi mian kutimon en miaj poŝoj, ne uzante ion, k faris bonajn spertojn per tiuj ĉi mallongaj memsugestoj, kiujn mi de tempo al tempo ripetis. Multaj personoj provas atingi la saman celon, sed ili uzas jenajn memsugestojn: "Mi volonte ne plu fumus, sed mi ne povas" aŭ: "Mi ne plu volas fumi." Tial ili ne sukcesas, kontraŭe, ili fumas ankoraŭ pli multe ol antaŭe. Por atingi tion, kion K-do Doks deziras k esprimas en "S-ulo" per jenaj vortoj: "Batalante por nova homo, por nova sociordo", mi nur rekomendus al la Gek-doj trastudi k apliki: *La regado de si mem per konscia aŭtosugesto* de E. Kue (Coué), laŭ kio certe tre multaj poste diros, kiel s-o Freŭd el Vieno: La ĝisnuna edukado similas al iu persono vestita per tolaĵoj, kiu devas per la kartoj de l' italaj lagoj ekkoni la arktajn regionojn. *SAT-ano 9542.*

Korekto. En la artik. "Esp. k Radio" (n-o 287, p. 310) mankas post la 12-a linio jenaj vortoj (pro ellaso de linio): "la fakto, ke laboristoj posedas nur . . ."

Esperanto-Servo

N-o 29 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 17. Aprilo 1930

EL SVEDIO

Senlaboreco en Svedio

201 (Esp.-Servo.) Kiel en aliaj kapitalistaj landoj, ankaŭ en Svedio ekzistas grandega senlaboreco. Sed estas tre malfacile, citi nombrojn pri tuta amplekso de senlaboreco en "nia" lando. Sindikate organizitaj senlaboruloj estis: 30. 9. 29 22 271; 31. 10. 29 27 529; 30. 11. 29 33 581; 31. 12. 29 53 977. Konsideru, ke en Svedio tre multaj laboristoj ne estas sindikate organizitaj. Laŭ plej singarda kalkulo certe ne estas malpli ol 120 000 senlaboruloj. Sole en la ĉefurbo Stokholmo estis nombrataj la 31. 12. 29 12 000 senlaboruloj. La vivo de senlaboruloj estas plej mizera, ĉar en "nia" lando ne ekzistas ŝtata asekuro por senlaboruloj. Nur 2000—3000 senlaboruloj ricevas ĉiujare "ŝtatan laboron" (nomata: mizera laboro). Tiu laboro ankaŭ estas malbonege pagata; la salajroj dividiĝas laŭ 10 grupoj k estas jenaj: grupo 1 — 6,10 kronoj (ĉiutage); 2 — 5,85; 3 — 5,60; 4 — 5,30; 5 — 4,95; 6 — 4,60; 7 — 4,25; 8 — 3,95; 9 — 3,70; 10 — 3,45 kronoj. Pohoraj salajroj estas por grupoj 1—4 — 0,50 krono (50 oeroj); 5 — 0,45; 6—7 — 0,40; 8—10 — 0,35 krono. Nur malmultaj senlaboruloj ricevas iufoje monan subvencion de la ŝtato — sed maloftege! Laboristoj, kiuj estas okupataj ĉe "mizer-laboro", konstruas novajn vojojn k fervojojn k riparas malnovajn. Ekz. dum la jaroj 1918—1924 "mizer-laboristoj" konstruis 270 mejlojn da novaj vojoj en Svedio, krom multaj aliaj laboroj. *13 127, Karlsborg.*

EL ĈEĤOSLOVAKIO

Ankaŭ ĉe ni senlaboreco kreskas

202 (Esp.-Servo.) Laŭ oficiala statistiko estas notitaj fine de januaro 1930 73 891 senlaboraj personoj. En la sama monato pasintjare oni kalkulis nur 53 247 senlaborulojn. Estas kompreneble, ke tiu statistiko ne estas kompleta, la senlaborulara nombro estas multe pli alta. *Balicki, Stonava.*

EL GERMANIO

Vendado de infanoj

203 (Esp.-Servo.) Jen mi prezentas kelkajn simptomajn ekzemplojn pri la mizera situacio de l' germana laboristaro. 1. Patro de tri infanoj, kiu jam longan tempon estas senlabora, vendis siajn infanojn al riĉaj seninfanaj geedzoj por po 1000 markoj. Per la mono li volis fondi novan sendependan ekzistadon. 2. Familio kun 9 infanoj vivis jam dum kelkaj monatoj en grandega mizero, kio kaŭzis, ke ili provis vendi unu el la infanoj al multpagonto. 3. Familio aĉetis meblaĵojn je partopago. Pro kelkmonata senlaboreco la patro ne povis daŭrigi la pagadon. La meblovendisto minacis per forpreno de la meblaĵoj. Por povi daŭrigi la pagadon, la geedzoj volis vendi trijaran fileton. — Ĉi malmultaj ekzemploj montras, ke mizeriĝinta proleto plene degeneriĝas k eĉ pensas pri vendado de *siaj* infanoj al la klasaj malamikoj. Germanio super ĉio . . . *10 596, Nieder-Salzbrunn.*

EL POLIO

Kunveno de senlaboruloj

204 (Esp.-Servo.) En lastaj tagoj de marto okazis kunveno de senlaboruloj ĉe "Gajera placo" en Lodz. Kunvenis kelkmil laboristoj kun kelkaj deputitoj. Policaj fiagentoj, kiuj ne mankis tie, provis kalumnii la deputitojn per fiparoloj, sed la deputitoj kraĉis al ili. Tri horojn daŭris, ĝis kiam la polico sukcesis disigi la kunvenintojn. *Oel.*

Kiajn metodojn aplikas la faŝismo

205 (Esp.-Servo.) K-do Roŝak, ano de la kom. sejm-frakcio, paroladis antaŭ laboristaro en Pabjanice (apud Lodz). Policaj agentoj k faŝistoj komune forte batis k vundis lin. Poste ili disfamigis per gazetaĉaro, ke li defraŭdis monon k pro tio la elektintoj venĝis je li. Tiajn metodojn aplikas la pola faŝismo. *Rob. Oel.*

Laborista sejmfrakcio ne tro fortiĝu

206 (Esp.-Servo.) La mandaton de la malliberigita K-do Ŝpieberg, anstataŭanto de la punliverita parlamentano Bitner (el la kom. sejmfrakcio) la "plej alta ŝtata juĝejo" rifuzis pro lia puniteco, malgraŭ ke dum lia elekto li estis ankoraŭ senpuna. La laborista sejm-frakcio ne tro fortiĝu! *Rob. Oel.*

Protesto de "sanktuloj" kontraŭ religipersekutoj en Sovetio

207 (Esp.-Servo.) En societo de religiuloj "Agida" en Lodz okazis protestkunveno kontraŭ religi-persekutoj en Sovetio. Al la kunveno alvenis grupo da laboristoj, kiujn la religiuloj ne enlasis. La laboristoj, forpuŝinte la gardostarantojn, eniris. Sed la religiuloj vokis policon, kiu arestis kelkajn laboristojn. Tiajn kunvenojn la burĝaro okazigas en la tuta lando, por prepari kontraŭsovetiulojn . . . Sed tre malmultnombraj ili estas. *Rob. Oel.*

EL FINNLANDO

Denove faŝistaj fiagoj

208 (Esp.-Servo.) La 27.—28. de marto nokte finnlandaj faŝistoj montris ree sian pretecon por ĉiaj krimagoj; ili enpenetris en presejon en urbo Vaasa, kie estas presataj du kom. gazetoj ("Työn Ääni" k "Työväen Lehti"). La tutan ilaron de la presejo oni detruis, la presmaŝinojn samkiel la kompostmaŝinojn k. c. La difektitaĵoj valoras ĉ. 200 000—300 000 fmk. La krimago estis tre bone organizita. Per pafado oni logis la policistojn aliloken; dum la detruigo de la maŝinoj preterveturis sur la strato forte bruantaj veturiloj, kio malhelpis aŭdi la detruadon. Krome la tuta telefonreto de la urbo estis izoligita de la aliaj lokoj ktp. Unu personon la polico devis aresti, ĉar en la presejo oni trovis lian tranĉilon kun la nomo; sed ankaŭ lin oni reliberigis — laŭdire pro minacoj de "patrolandaj" krimulamasoj, kiuj kolektiĝis antaŭ la policejo. Tiel la faŝismo jam nun diktatoras Finnlandon. — Ĉar en la parlamento antaŭ kelka tempo oni malaprobis la nuligon de l' preslibereco, la reakciuloj intencas per cititaj fiagoj malebligi eldonadon de kom. gazetoj. Ke la faŝismo ankaŭ estas tre favorata de la finnlanda burĝaro, montras kunveno de faŝistoj okazinta fine de marto en Lapua. Oni proponis marŝadon al la ĉefurbo, t. e. oni minacis nuligi la nunan konstitucion. Plue oni decidis unue forigi el la parlamento la kom. deputitojn, kompreneble perforte . . . ktp. La registaro nenion faras por malhelpi ilian agadon k nun montriĝis ia unua rezulto per detruigo de presejo en Vaasa. La soc.-dem. k kom. deputitoj faris interpelacion en la parlamento pro la okazintaĵoj en Vaasa. *14 142.*

EL ESTONIO

Arestadoj k mortigo

209 (Esp.-Servo.) Dum unuaj semajnoj en marto oni arestis en Estonio multajn laboristojn-revoluciulojn. Ankaŭ oni kaptis tri el Sovetio venintajn agitantojn; unu el ili estis mortigita de politik-policistoj dum kaptado. Laŭ oficiala statistiko oni arestis en la ĉefurbo 11 homojn, sed kompreneble la arestado daŭras en la tuta lando. La arestitoj estas akuzitaj pro preparo de ribelo dum venonta 1-a de majo. *15 428.*

EL ANGLIO

Kapitalistaj ĵurnaloj preferataj

210 (Esp.-Servo.) La nova kompartia ĉiutaga ĵurnalo "The Daily Worker" petis de la angla parlamentejo rajtigilon, por ke ĝiaj raportistoj havu lokon inter la ĵurnalistaro ĉe la debatoj. Oni rifuzis tion, pretekstante, ke ne estas loko, kvankam, laŭ eldiro de ĵurnalisto de kapitalista ĵurnalo, la raportistarejo estas granda kiom hotelo. Ricevinte la rifuzon, "The Daily Worker" denove skribis por ricevi permeson eniri la "lobby" (ejo por renkontado inter deputitoj k eksteruloj). Denove oni rifuzis, ĉar nur posedantoj de ĵurnalraportista rajtigilo rajtas eniri la "lobby"-on! Komentoj estas superfluaj. *E. K. L.*

SENNACIULA VIRINA PAĜO

Sub la kontrolo de Virina Sekcio de SAT. — Red. Adreso: Elma Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.

VIRINOJ KAJ LIBROJ

(Fino. Vidu n-on 284)

Riĉa filo de fabrikposedanto amas malriĉan kontoristinon, laborantan en la kontoro de l' patro. Antaŭe la reciproka amo estas sekreta, oni karesas k kisas k travivas la plej feliĉajn horojn de l' vivo. Sed en iu tago atingas ilin la malfeliĉo: la patro surprizas ilin dum delikata, intima sceno, plej ofte dum kisado. La amatino de l' filo svenas. Estiĝas akra disputo inter la filo k la patro, el kio rezultas forpelo de l' amatino. Sed la amo daŭras; ili eltrovas novajn vojojn k eblojn, por ankaŭ plue renkontiĝi. Spite ĉiuj malpermesoj de l' patro, la filo fianĉiĝas k li estas senheredigata. Sed ankaŭ tiu ĉi faro ne povas disigi la geamantojn. La amo regas super ĉio, ĝi eĉ pliardiĝas ĉe ĉiu nova malhelpaĵo! Post multaj bataloj k malfaciloj okazas, ke finfine la patro agnoskas la fianĉinon de sia filo k nun ĉiuj penteme reunuiĝas. Sekvas luksa, brila k grandioza edziĝfesto . . . Tio estas la "spirita enhavo" de multaj romanoj; ankaŭ estas aliaj temoj, sed ili estas same malprofundaj, senspiritaj! Kaj tiajn fiaĵojn kvazaŭ englutas niaj laboristaj virinoj, ili sidas dum vesperaj horoj k duonaj noktoj legante k opinias "emocia, kortuŝa" la enhavon . . . Mi eĉ jam observis, ke virinoj dum tia legado ploris, ĉar "la geamantoj tro suferas k ĉar ili tute ne estas eble kuniĝi!"

Kial ili legas tiajn malprofundajn librojn k kial ne la verkojn de niaj proletaj poetoj, kiuj ja ankaŭ verkis tre legindajn por virinoj librojn? La kaŭzon oni devas serĉi en tre profundaj psikologiaj regionoj. En sia junaĝo la plej multaj virinoj revas pri harmonia, senzorga, amplenigata vivo dum estonta edzeca periodo. Tiu ĉi penso akompanas la junulinon dum tuta ŝia fianĉina tempo, ĝi enpenetras tiel forte ŝian cerbon, ke ŝi tute ne povas imagi, ke la estonta vivo povus fariĝi aliel. Kelkfoje plenumiĝas la vivorevo, sed plej grandparte ĝi estas senkompate detruata de la realo.

La edzo estas nur simpla laboristo k ne, laŭ la imago fianĉina, bonege pagata oficisto, k ŝi eble estas devigata ankaŭ iri en fabrikon por akiri monon, ĉar aliel la vivo estas tro mizera. Ĉiujn hejmajn laborojn ŝi nun mem devas fari, k ne estas prizorgata la mastrumado de servistino, kiel ŝi tiel belege revis dum la antaŭedzina tempo. Se la edzo eĉ fordrinkas duonon de sia perlaborita salajro, tiam la vivo de virino fariĝas tute griza, seniluzia. La revoj k deziroj devas esti flankenmetataj en la sferon de l' subkonscio. Sed ni tre bone scias, ke ĉiuj deziroj aŭ postuloj, kiujn oni ŝovis en la subkonscion, iam reaperos, ĉu dum noktaj songoj, ĉu dum nekonsciaj agoj. Kaj la legado de l' supre priskribitaj libroj, kies enhavo konformas al la iamaj virinaj deziroj, estas certe nekonscia ago. La virinoj legas ilin, ĉar ili dume forgesas la ĉiutagajn zorgojn k penojn k ĉar ili denove travivas belegan junecan vivorevon. Ili pro tio evitas la verkojn de niaj laboristaj poetoj, ĉar en ili tro reale estas priskribata la homa mizero, k dum tia legado oni ĉiam denove estas ekmemorigata pri sia propra sorto . . .

Feliĉe ne ĉiuj lab. virinoj foruzas tiele sian valoran tempon. Multaj jam ekkonis la ĝustan valoron de ĉi tiuj libraĉoj, k inter la konsciaj K-dinoj estas tiuj el la socialistaj k komunistaj junularorganizoj k el la laboristpartiaj viringrupoj. Per multaj klerigaj paroladoj ili estas instruataj, ke oni per aĉeto de filibroj subvencias nur kapitalistajn entreprenojn, kiuj celas per tiaj libroj deteni la virinojn de l' klasbatalo. En la virinaj revuoj oni trovas recenzojn k rekomendojn pri legindaj libroj. Ankaŭ oni povas konstati, ke multaj virinoj prunteprenas jam en sindikataj librejoj. Tiel estas ĝuste! La virino fariĝu same klaskonscia kiel la viro; tiam nia lab. movado baldaŭ plifortiĝos k daŭre progresos! La SAT-aninoj helpu al la edukado de siaj samseksuloj per konsiloj k bonaj ekzemploj!

Vira SAT-ano: *Fr. Riedel (14 981), Giessen.*

"KARMEN" NE ESTAS LA TIPO DE LA HISPANA VIRINARO

Nek estetike, nek literature, nek fiziologie, nek racie.

Kio do estas "Karmen"?

Karmen estas sole literatura kreaĵo de la franca romanisto Prospero Merime (Merimée), inspirita per ia tragedia anekdoto, kiun li konis aŭ oni rakontis al li dum liaj vojaĝoj tra Hispanio ĉe la tempoj de "Jose Maria" k cetera legio el famkonataj banditoj, kiuj tiom allogis k ankoraŭ allogas la transpireneajn verkistojn.

Sed iom reala, aŭ nur imaga, Karmen ne montras la rason nek eĉ sintezon de la hispanaj virinoj. Ankaŭ ŝi ne povas esti la pratempa k originala virina hispana tipo.

Karmen same parolis "kalo" (? Red.) kiel baske, kiel kastile. Al Merime ŝi diris, ke ŝi naskiĝis en Etchalar, ke iuj ciganoj alportis ŝin al Seviljo. Merime mem dubis pri ŝia pura cigana deveno, sed ŝi fieris aparteni al ĝi k amadis la ciganojn k adeptiĝis je iliaj moroj.

Nenian trajton de hispanino havis tiu bela virino el delikata haŭto "sed kun nuanco iomete kuprokolora; el oblikvaj, sed mirinde striitaj okuloj; el lipoj iom dikaj, sed perfekte desegnitaj; kun dentoj pli blankaj ol senŝelaj migdaloj, k kun hararo iom maldelikata k nigra kun bluaj reflektoj kvazaŭ flugilo de korvo, longa k brila." Ĉi tiu bildo, kiun al ni transdonas Merime pri la Karmen, kiun li konis en Kordovo, rememorigas al ni la aŭtentikajn egiptajn skulptaĵojn, kiujn oni vidas en la muzeoj de Kairo, de Luvr (Louvre) ktp. reproduktitaj en preskaŭ ĉiuj Historioj de l' Arto: "koloro kupra, oblikvaj okuloj, dikaj lipoj perfekte desegnitaj" jen eble ĉiuj nuancoj de prahistoria raso, primitiva sendube, dissolvita pro mestiziĝoj ĉe la miksiĝo de l' rasoj antikvaj kun modernaj.

Tradukis ekstrakte el hispana lingvo
R. Kiles (13 661), Valencia.

Instruistoj, edukistoj, gepatroj
abonu al
Sennacieca Pedagogia Revuo

KIEL INFANOJ LERNU NIAN LINGVON

Vivinte en Usono multajn jarojn, mi spertis, ke estas grave k facile, se enmigrintoj volas lernigi al siaj infanoj la gepatran lingvon, komenci en la plej juna aĝo. Ekzemple, se germanaj gepatroj dekomence parolas persiste germane kun sia infano, ĝi lernas nature paroli tiun lingvon. Intertempe konatoj k amikoj angle parolantaj kelkfoje vizitas ilin k la infano lernas pro la angla konversacio ankaŭ tiun lingvon, sed precipe pro la ludado kun angle parolantaj infanoj. Ofte okazas, ke la infano alparolas la patron aŭ patrinon angle k necesas por ili obstine rifuzi respondon, ĝis la infano parolas germane; aliel ĝi emas ignori la lingvon, kiun ĝi nur parolas kun la gepatroj. Ofte la pli aĝaj infanoj samtempe scipovas paroli ambaŭ lingvojn, sed la pli junaj nur povas *kompreni* la germanan, sed ne *paroli* ĝin. Do estas nenia danĝero, ke la infano ne lernos kontentige la nacilingvon, se la gepatroj tuj en la komenco ekparolas esperante kun ĝi. Sed estas tiu grandega profito por la infano, ke ĝi posedas esperanton tiel nature kiel la nacilingvon. Kaj ĉar esperanto havas la estonton, la infano kreskanta komprenos ĝian valoron pli k pli k sentos dankemon por siaj gepatroj.

K-dino 8070.

TRA ESPERANTIO

NI GARANTIAS LA SENMORTECON AL ESPERANTO

Eksterordinara tago de du SAT-anoj

Al ni ŝajnas, ke en "S-ulo" la plej grandan intereson inter esperantista legantaro havas la faketo el persona ĉiutaga vivo de SAT-anoj, kun artikoloj: "Tago el mia vivo", "Kiel mi fariĝis esperantisto" ktp. La artikoloj estas ne nur personaj priskriboj k travivaĵoj, sed karakterizas vivon de plimulto da SAT-anoj. Sed bedaŭrinde ni neniam ĝuis tralegi eksterordinaran tagon de multaj esperantistoj: "Kiel mi edziĝis" (edziniĝis). Ja ĉi tiun aferon ne tre ofte travivas ĉiu homo. Se karaj legantoj de "S-ulo" permesos, ni kun plezuro rakontu tuj "kiel ni geedziĝis".

La Oktobra Revolucio donis plisimpligon de l' geedziĝa problemo. Eklezio, kutimo, moro k antaŭjuĝo, ĉi tiuj heredaĵoj de la pasinta epoko, por geedziĝokazoj ludis gravan k vastan rolon, tre ofte fuŝante la tutan vivon de l' geedziĝintoj. Ofte neniun interesis la demando: ĉu juna fianĉino amas sian fianĉon, ĉu ŝi aspiras esti lia edzino? Volo de l' gepatroj k iliaj interesoj estis jam leĝo por la gefiloj. Rezulte, la vivo de l' geedzoj estis kvazaŭa infero, ĉiutagaj dramaj epizodoj, malkontento. Drinkado, insultado, batado estis laŭleĝa kutimo. Larmoj, ĝemoj de la viktimo de turmentisto-edzo, estis vanaj, senhelpaj. Vivu, toleru. Edzino devas obei al edzo — tiel traktas la eklezia leĝo, kiu jam ĝis tombo katenas la geedzojn.

Dank' al Revolucio tio restis nun nur por fabelverkistoj k arkivo. Malproksimen k por ĉiam, estas forĵetitaj la antaŭjuĝoj. Nun plena libero regas en tiu rilato. Nenia devigo, nur reciproka interkonsento.

Ŝajnas, ke ĉiu esperantisto bezonas trovi kunulinon (aŭ inverse) ne nur aprobanta esp-on, sed dividanta la ideon kun sia edzo. Nia devizo devas esti: Esp-o estu dua lingvo en esperantista familio. Do ne nur gepatroj posedas ĝin, sed suĉinfanoj jam kutimu elparoli esp-e.

Ni SAT-anoj: 9682 (Erjuĥin Aleks.) k 14 823 (Vojcickaja Ludmila) geedziĝis en komenco de marto 1930, en malproksima norda havenurbo Arĥangelsk, k pro tio ni sendas al la tutmonda SAT-anaro nian koran k sinceran saluton.

Antaŭ ne longe ni vizitis "ZAGS" — registrejon de okazoj de la civitana stato, ĉe loka administra fako de soveto. Plenigo de la speciala enketo prenis tempon ne pli longan ol 5 minutoj. Ni subskribis niajn nomojn k de nun ni ambaŭ prenis unu familinomon: Erjuĥin. Por registrado oni nenion pagas. En niaj pasportoj estas forstrekitaj vortoj fraŭlo k fraŭlino, k farita noto pri geedziĝ-registrado. Hejme laŭ ĉi tiu okazo ni aranĝis modestan familian vesperon en malgranda rondo de parencoj k amikoj.

Vivante nun duope ni havas oportunan eblon perfektiĝi en esp-o. Pro nia esp. parolado oni nomas nin mokeme: eksterlanduloj el Ĥolmogori (patrujo de K-do 9682). Luita de ni ĉambro estas malgranda, nur por du personoj, k plene estas ornamita per diversaj esperantaĵoj, abunde pendigitaj sur la muroj, la ĉambro kvazaŭ prezentas iun ekspoziciejon. Iam ni duope kantas en esp-o sub akompano de gitaro (ni ambaŭ scias ludi per tiu muzikilo).



Karaj K-doj projektantaj iam geedziĝi, pripensu, ke la triumfo de esp-o postulas plenan enkondukon de la lingvo en esperantista familio. Ni devas doni al la homaro esperantistidojn kiel garantion por senmorteco de la lingva ideo. Ni kredas, ke esp-o ĉe geedzoj esperantistaj helpos al plibeligo k ĉarmigo de la vivo. Ja ĉiama apliko de esp-o donas multajn avantaĝojn al intima vivo de geedzoj k al ĝenerala progreso de esp-o.

Ni du esperantistoj kunligitaj per esp.-ideo, ĵure dediĉas nian vivon al la triumfo de *unualingva homaro.*

SAT-anoj *9682 k 14 824, Arĥangelsk, USSR.*

De individua al kolektiva korespondado

En disvolviĝo de nia ruĝverda esp movado sentiĝas grava baro: ĝi kun malsama rapido progresas en diversaj landoj. Dum en Sovetio la kvanto da esp-istoj k uzantaj ties servojn en sia internacia korespondado kolektivaj, fabrikaj organizoj senĉese kreskas, en aliaj landoj, krom eble Germanio, tiu kresko postrestas, per tio kreante minacon al plua progreso de esp-o en Sovetio. Kiam ni volas organizi kolektivan korespondadon de niaj laboristoj, oficistoj, lernantoj kun postlandlimaj K-doj, ni ne sukcesas ofte trovi en eksterlando perantojn. Je niaj petoj oni respondas, ke oni estas superŝutitaj de similaj proponoj k ne havas fizikajn eblojn ĉiujn plenumi. Vere estas tiel, ĉar kutime en ĉiu loko nur kelkaj aktivuloj, entuziasmuloj oferas tutan sian liberan tempon al per- k por-esp-a laboro. Partopreno de la aliaj en esp. movado en pli bona okazo konsistas el pago de kotizoj, abono al esp. gazetoj, individua korespondado. Sed ĉu ni studis la lingvon por distro, por interŝanĝado de ilustritaj kartoj k poŝtmarkoj? Ne, proletaj esp-istoj sin nomas *proletaj,* ĉar ili uzas esp-on por servo al laboristaro. Nuntempe estas krimo antaŭ esp-o k sia klaso amuziĝi nur per persona korespondado. Ĉiu esp-isto devas gvidi aŭ peri internacian korespondadon. Tiun ĉi spiriton devas sugesti al siaj esp. lernantoj ĉiu kursgvidanto. Ĉiu esp. rondeto, kurso jam post 3—4 monatoj de funkciado devas iom post iom transformiĝi en stabon de internacia korespondado en sia urbo, vilaĝo, fabriko, devas komenci peradi individuan k kolektivan korespondadon.

En kontraŭa okazo nia movado ankoraŭ daŭre havos "amatoran" karakteron. *S. Bojev, Saratov.*

MALGRANDAJ NOTOJ

Socialisma konkurado

Preninte kelkajn taskojn rilate soc. konkuradon ("S-ulo" n-o 274), mi informu pri rezultoj: La konkurado inter lab. rondoj de Leningrad k Limbach ne sukcesis. Kaŭzoj: Rondo de Limbach ne respondis, sekve — ne akceptis, rondo de Leningrad depost januaro ne kunvenas: pli ol duono da partoprenintoj ŝanĝis laborejon k labortempon. Tamen, rezulte 3 novaj abonoj al "S-ulo" k regula priservo de fabrika presgazeto. Mia persona tasko estas plejparte plenumita: 13 Gek-doj abonis "S-ulo"n k promesis aboni la tutan jaron (por ke ili ne forgesu daŭrigi abonon, jen la nomoj: Isaev, Sokolov, Bilĉinski, Belanova, Sevastjanova, Mjalk, Ŝnel, Miĥajlov, Pilev, Ruvinski, Krasnjuk, Saan, Monoson). Ankoraŭ du K-doj promesis aboni.

Post reeĥo de K-do Bässler (n-o 276) laŭ lia propono mi ricevis kelkajn leterojn pri akcepto de la konkurado de 1. K-dino Buchholz, Essen, 2. K-do Männchen, Breslaŭ, 3. K-do Perhak, Ĉeĥosl. Bedaŭrinde ne ĉiuj starigas antaŭ si ĝustan planeton de l' taskoj. Laŭ mi, neniu peranto devas esti por kontroli la konkuradon. Ĉiu konkuranto mem observu la aferon k plenumu sian devon, sendu sian planeton al "S-ulo" k ankaŭ informu pri rezultoj siatempe. Kial do aliaj alvokitoj silentas? *P. Tilin (9310), Leningrad.*

Alvoko al Ĉeĥoslovakia SAT-anaro!

Por ke "S-ulo" restu ne nur 12-paĝa, sed ĉiam progresu venonte, k povu plenumi sian taskon, la

Stonava SAT-anaro decidis varbi por SAT ĝis 30. 6. 1930 dek (10) novajn SAT-anojn k 5 abonantojn al "S-ulo". Alvokante ankaŭ aliĝi varbadon en *laŭebla forto k nombro* la K-dojn: Klimŝa A., Trinec, Potysz V., Karvina, Stankus J., Poruba, Chudoba E., Karlsbad, k ĉiujn aliajn ĉeĥosl. SAT-anojn, ni provu duobligi la nombron de SAT-anoj en nia lando! Montru vian plenan volon k fervoron, k la tasko plenumiĝos. Komisiite: *J. Balicki (8139).*

"Pjatidnevka"n ni esperantigu!

Depost jan. eldoniĝas en Moskvo bela ilustrita gazeto laŭ tipo de AIZ, "Pjatidnevka" (Kvintago), kiu aperas ĉiun kvinan tagon. Eksterlandaj K-doj ricevantaj ĝin de siaj sovetiaj korespondantoj, povus bone kompreni la signifon de l' bildoj, se — la subskriboj estus esp-aj. Do, sovetianoj k nesovetianoj, klopodu tiucele ĉe la redakcio. Ekskribu! Adreso: *Moskvo,* Tverskaja 15, red. "Pjatidnevka". *B. Egers (4544).*

Suplemento al la adresaro en Jarlibro

(Tiu ĉi nomaro ne estas por korespondemuloj)

(5-a daŭrigo. Vidu n-on 284/88)

Samara (Sovetio)
12684 *Afanasjev Nikolao,* Vilonovskaja 110, fervoj. librotenisto.
15692 *Toporov M.,* Nikitinskaja 50 kv. 1, lernanto.
Salzburg (Aŭstrio)
15629 *Zagler Rudolf,* Mozartstr. 19.
Saratov (Sovetio)
15864 **Liĥaĉeva K.,* Pokrovskaja 7 kv. 2, ŝtatoficistino.
15704 *Nikolaev I.,* Miĥajlovskaja 5 kv. 1.
15863 **Osipova V.,* M. Kostrijnaja 18.
Schweinfurt (Germanio)
15873 *Hanek K.,* Burggasse 8, seruristo.
Sebastopol (Sovetio)
15583 *Galdneeks R.,* Tamojnaja.
15795 *Iaĉinov V.,* Korabelnaja, str. Dzerjinski 1, tradukisto.
15584 **Lapŝino N.,* Zelenaja Gora, zemlja Morozova, kontoristino.
15797 *Rakŝa V.,* Oĉakovskaja 26, oficisto.
15796 *Tretjakov P.,* Korabelnaja stor., ul. R. Luksemburg 72, kv. 2, motoristo.
Sebrjakovo (Jugo Vost. j. d., Sovetio)
15917 *Popov J.,* Sadovij per. 4.
Sheffield (Britio)
15683 *Lygo A.,* Southey Hall Rd. 24, kompostisto.
Shiga-ken (Japanio)
15615 *Yamamoto-Sazoo,* Terasho-mura, Kooga-gun.
Simferopol (Sovetio)
15603 *Jasinskij A.,* str. Karaimskaja 34/2.
Sisteron (B. A., Francio)
15934 *Vignet V.,* Quartier St. Pierre le Bas.
Skoghall (Svedio)
15724 *Ahlgren G.,* Vidon 610.
15727 *Andersson N.,* Lunden 449.
15726 *Olin E.,* Lunden 467.
15725 *Olsson J.,* Brukel 208.
Slavjanskij Kurort (Sovetio)
15772 **Bojko A.,* Blaĥoveŝĉenskaja 5.
Sosnowice (Polio)
15606 *Londner L.,* str. Sienkievicza, horloĝisto.
St. Albans (Herts, Britio)
15737 **Mathews L.,* Burnham Rd. 69, edzino.
Stalingrad (Sovetio)
15896 *Litvinov B.,* Lipeckaja 23, librotenisto.
15575 *Kulikov G.,* Kamenskaja 5, ledaĵisto.
15897 **Ŝmidtova N.,* str. K. Libkneĥta 6.
St. Florian b. Linz (Aŭstrio)
15663 *Hoghofer F.,* Niederfrauenleiden 7.
Stettin (Germanio)
15860 *Driechelt W.,* Schallehnstr. 30, b. Herzog, tajloro.
Stockholm (Svedio)
15794 *Persson A.,* Folkungagatan 102 v. g.
Stonava (Ĉeĥoslovakio)
15557 *Miczka J.,* bakisto.
Stuttgart (Germanio)
15771 *Schwalbe E.,* Elisabethenstr. 28/3, ĥemigrafo.
Sulin (Sev. Kav., Sovetio)
15591 *Andreev P.,* 3 Nagornaja 21.
15903 *Manĉenko A.,* Pervomajskaja 24.
Surajevka (Zejskogo okr., Sovetio)
15718 *Tennikov E.,* Elektrostacio, Sal. V. Kr., Vokzalnaja d. Gorkomĥoza.
Svedalla (Svedio)
15862 *Österberg C.,* Box 28, metallaboristo.
Ŝaĥti (Sovetio)
15921 *Dolgov B.,* rudnik im. Kominterna nesvetaevskaj bolnica.
15910 *Grunskij Johano.*
15909 *Smotriĉ Aleks.* (Daŭrigota)

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

AŬSTRIO. Salzburg. La grupo startigis gazetservon. La loka soc. dem. gazeto enhavas ĉiusemajne ĉ. 10 linian esp.-rubrikon (tekstoj el "S-ulo", kun cito de l' fonto.) — *BRITIO.* Funkcias ĉe la nordanglia regiona komitato de Brita Socialista Gildo de Junularo (I. L. P. Guild of Youth) internacia koresp. oficejo, kiu senkonscie kreis esp. grupojn en la lokaj branĉoj de l' gildo. La komitato ĉi-regiona funkcias inter junministoj ktp. en Durham, Northumberland k Nordjorkŝiro, krom Cumberland. Komence de aprila n-o aperos en soc. junulara revuo "Socialist Youth" esp. rubriko, kiun gvidos K-do Latimer. Sur la tagordo de l' tutlanda kongreso (okazonta pentekoste en Bradford) staras propono "alvoki la registaran edukadfakon por enkonduki esp-on en lernejoj, kiel fundamenta lingvo anstataŭ la latina." (Salutojn por la konc. kongreso oni adresu al William Latimer, ILP. G. Y., Trades Hall, *Carlisle,* Anglio.) *(10 634.)* — *ĈEĤOSLOVAKIO.* En *Klatovi* K-do Pelcman el *Plzen* gvidas kurson kun 23 p. (Inter ambaŭ urboj estas distanco de preskaŭ 50 km.!) La sama K-do gvidas en *Plzen* kurson kun 10 p. ĉe societo de lab. turistoj. — *GERMANIO.* "Arb. Esperantist" anoncas fondiĝon de novaj LEA-grupoj en Wechselburg, Amberg, Ribnitz, Templin k Frankfurt-Nied. De 3. k 4. majo renkontiĝos diversnaciaj lab. esp-istoj en limurbo *Lindau* (Bodensee) por manifestacii por esp-o. — *Karlsruhe.* 19. 3. komenciĝis kurso kun anoj de junkom. ligo. Ĉ. 20 p. Lernolibro laŭ gramatika metodo. Gvidanto 15 652. — *SVEDIO.* La sveda monata ŝakĵurnalo "Schackvärlden" enkondukis esp. kolonon, kiu akceptos kunlaboraĵojn de ĉiuj ŝakistoj, kiuj volas rekte en esp-o publikigi problemojn, interludojn aŭ raportetojn el la ŝaka vivo. — *Malmö.* Krom lab. esp. klubo ĉi tie ekzistas ankaŭ neŭtrala, kristana, tramista ktp. Ĉ. 50 p. lastvintre partoprenis la studrondojn aranĝitajn de nia klubo en ABF (Klerigasocio), kiu lasta tre favoras nian laboron, i. a. senpage disponigante sian hejmon por kunvenoj. Dum febr. la klubo aranĝis 4-semajnan kurson laŭ rekta metodo (en kadro de ABF). Instr. Ad. Ŝvarc (Germ.). Bona rezulto post 16-foja kunveno. La SAT-anaro k abonantaro al "S-ulo" malrapide, sed certe kreskas. Notinda estas la favoro de l' loka socialdem. ĉiutaga gazeto por esp-o. En ĝi aperas de pli ol jaro kolono semajna. Aperis ekz. plena kurso en ĝi, ankaŭ esp. tekstoj. Lastatempe okazis grandaj esp. paroladoj: La hindo Sinha parolis en Popoldomo antaŭ granda publiko, same la aŭstria kalkul-laboristo Frey. En la nomo de sia ŝtato k turismo li profitas k monelsuĉas esp-istojn. *(13 132 E. N.)*

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

ĈE LA KATOLIKOJ

En "Espero Katolika" de 1. aprilo turnas sin la estro de esp-ista laboristaro kristana en Aŭstrio per alvoko al la tutmonda katolika laboristaro esp-ista k faras i. a. jenan konstaton: "La bolŝevismo k ĉiuj ĝiaj branĉoj: la socialismo, komunismo ktp. tre akurate obeis la konsilon de Marks: 'Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu.' Sed ili ankaŭ ekkonis la nepran neceson de komuna lingvo por la internacia organizo k akceptis esp-on kiel supernacian lingvan interkomprenilon k ili propagandas k flegas ĝin grandstile en ĉiuj socialistaj organizoj de la mondo." Poste li demandas: "Ĉu nur la bolŝevista laboristaro bezonas esp-istan centron?" k proponas krei laboristan fakon ĉe la katolika esp. organizo IKUE — "por la pli granda glorigo de Dio, por la honoro de nia sankta patrino, la Eklezio Katolika, por la savo de la laboristaro k fine por la mondpaco."

* * *

En la sama n-o de "E. K." ni trovas jenan opinion de iu sennoma esp. katoliko: "... La vero estas, ke la granda publiko plejparte sin tenas rilate al ni aŭ indiferente, aŭ eĉ ofte malamike. Kaj tiu malamikeco vidiĝas precipe ĉe kleruloj, profesoroj aŭ pastroj, kiuj konas la latinan lingvon. Por ili esp-o estas tro simpla, tro demokrata, ja, pardonu la nevolan ludvorton, tro SAT-ana ..."

* * *

"E. K." notas ankaŭ laŭ pola katolika jarlibro pri la malsukceso de katolika kongreso dank' al la uzo de *latina* lingvo. Temas pri internacia kongreso pri reunuiĝo de la eklezioj. "... Estis nur 150 partoprenantoj, kies nombro, jam la duan tagon, malpligrandiĝis je la malpli granda duono ... Kiel unu el la ĉefaj kaŭzoj de malsukceso oni devas konsideri la latinan lingvon, en kiu la lekcioj k debatoj estis faritaj. La latina lingvo estu kia ajn, ĝi estas tro malviva lingvo, ĝi naŭze katenas jam la parolantojn, ĝi tute lacigas la aŭskultantojn, ankaŭ eĉ la pastrojn, k ĝi fortimigas la ortodoksulojn."

Do, eĉ en sia plej propra regno, ĉe la katolika Eklezio, la latina lingvo ne plu havas ŝancon konkuri kun esp-o.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

E. Sazonova, Tuta Esperanto. Gramatiko, ekzercoj, vortaro. Eld. CK SEU, Moskvo, 1930. 48 pĝ. Form. 11×44 cm. Prezo: 14 kop. Ruslingva Eldonkv.: 25 000.

Tiu ĉi broŝuro tre similas la konatajn Ĉefeĉ-ŝlosilojn, enhavas esp.-rusan vortareton, la gramatikajn regulojn, afiksaron k kelkpaĝan esp.-lingvan ekzercaron. Ĝia koncizo eble allogas multajn ekstudi nian lingvon.

Poŝtkarto kun kalendaro de seninterrompa laborsemajno (en Sovetio). Eld. CK SEU, Moskvo. Eldonkv.: 5000 Prezo: 5 kop.

H. J. Bulthuis, L. K., Robinsono Kruso. Legolibro por geknaboj laŭ Campe. Kompilita. Eld.: W. J. Thieme & Cie., Zutphen, Holando, 127 pĝ. Formato: 15×22 cm. Prezo: 1.95 fl.

Hendrik Conscience, La Leono de Flandrujo. El la flandra trad. H. J. Bulthuis, L. K. Rekomend. de Esp. Literatura Asocio. Eld.: W. J. Thieme & Cie., Zutphen, Holando. Prezo: 3.25 fl. (bind. 3.75). 310 pĝ. Formato: 15,5×23 cm.

Henrik Ibsen, Imperiestro kaj Galileano. Mond-Historia Teatraĵo. Trad. de H. J. Bulthuis, L. K. Rekom. de Esp. Literatura Asocio. Eld.: W. J. Thieme & Cie., Zutphen, Holando. 276 pĝ. Formato: 15×23 cm. Prezo: 3.50 fl. (bind. 3.90).

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":
Salzburger Wacht, Salzburg, 24. 3., El Francio (8361); *L'Humanité*, Paris, 29. 3., sovetia Ford (283).

Priesper. artik. k notojn enhavis:
Daily Worker, London, 28. 3., rubr.; *Der Eisenbahner*, Wien, 21. 3.; *Signalen*, Stokh., 27. 3.; *L'Effort*, Lyon, 29. 3.; *Dimanche Illustré*, Paris, 30. 3.

Pri SAT-Kongreso raportis:
Labor's News, Novjorko, 15. 2.

Peresper. materialon enpresis:
Vojovniĉij Bezvirnik, Kiev, 20. 3. (liberpensula gaz., kiu koresp. esp-e; fruntpĝ. titolo en ukr. k esp-o, peresp. mat. larĝe uzita).

NIA POŜTO

Al kelkiuj. — Mi ja legis en "Heroldo" pri ekzisto de pamfleto kontraŭ min; sed ĝis nun la aŭtoroj ne komplezis per sendo de ekz-o; k ankaŭ la eldonantoj ne sendis recenz-ekz-ojn; sekve ni ne rajtas scii, ĉu la verketo estas priparolinda, refutinda aŭ nur prisilentinda. *E. L.*

Ind. Rev. — Vian manuskripton ni ricevis; ĝi estos uzata.

EST. — Unu aŭ du el la versaĵoj ni uzos okaze. La novelo rilatas al "LNE". (Transsendon ni prizorgos.)

12 990. — Viajn bildojn ni uzos, almenaŭ parte. Dankon! *Red.*

10 578. — Por via let. ni pagis punafrankon. Bonvolu noti, ke let. ne kostas 10 kop., sed 14. *Adm.*

Bakistoj! Atentu!

Ĉu estas esp. amikoj, kiuj volas interrilati kun ni por interŝ. spertojn pri panbakejoj, teknike, konstruo de panfornoj, analizo de faruno k fermento, baki per vaporo. Ni estas panbakejo produktanta 2500 panojn po horo en unu el niaj fornoj. Skribu al: Frans Engels, De Keyzerlei 12, **Antverpeno,** Belg.

ATENTU! Inaŭguro!

Okaze de la 1. majo ĉi-jare, la organizita laboristaro k oficistoj de Riesa k ĉirkaŭo, samtempe ankaŭ festos la inaŭguron de novkonstruita popoldomo. Jam de longe ni bezonis propran hejmon, k nun ni atingis nian celon. SAT-perantoj en ĉiu lando, instigu viajn organizojn, ke ili sendu stampitajn salutleterojn k telegramojn. Ni propagandu per esperanto. Sendu ĉion al K-do Alfred Kiss, Gewerkschaftssekretär, Bismarckstr. 77, Volkshaus. *Riesa.* Germanio.

ĈIULANDAJ LABORISTOJ, sendu viajn infanojn al nia internacia

LABORIST-INFANHEJMO

socialista, vegetara, belege situita meze en Lüneburga Erikejo, en proksimo de arbaro, kun baneblo. — Tagprezo: 1,50 mk. g. — Ni parolas esperante, germane, france, angle. Detalojn sciigos al vi: Etti Gräffe (11 014), Laborist-infanhejmo. *Müden s. Oertze,* Kreiŝ Celle (Germanio).

Atentu raporton en sekvonta "S-ulo" ★

Ni gelaboristoj de 2-a urba ambulatorio serĉas gekorespondantojn el ĉl. Kun aparta ĝojo ni koresp. kun: flegistoj, kuracistoj, apotekistoj, L, PI, fotoj, gaz. — Ni garantias resp., div. donacojn k rekompencojn per belaj serioj de PI, afiŝoj, libroj ktp. — Skribu multnombre! Adr.: USSR, *Simferopol,* Dvorec Truda, Meĵd. Rab. Svjazj. por ambulatorio.

Allo, Allo!

Proletaro de la tuta terglobo, aŭskultu!

Je 1-a de majo ni aranĝas grandan internacian letervesperon kaj ekspozicion. Senprokraste sendu salutleterojn, poŝtkartojn, ĵurnalojn, gazetojn, fotojn k alian materialon. Ĉio estos rekompencata laŭ deziro per leteroj, ilustritaj poŝtkartoj, gazetoj, fotoj, poŝtmarkoj ktp. Adr.: Esperanta ĉelo, Komklub, *Omsk,* Siberio (Sovetio).

Ni petas la K-dojn, kiuj sendis salutleterojn ktp. al la Administracio de "Uj Harcos" (Nova Batalanto) atendi iomete, ni respondos al ĉiuj! Skribu ankoraŭ! (Adreso la suba.)
Esp. Grupo de Hungarlingvaj lab-istoj.

Atentu! Gek-doj hungarlingvaj laborantaj en diversaj landoj de l' mondo: Subtenu per abonoj nian 8-paĝan semajnan lab. klasbatal-gazeton "Fáklya" (Torĉo); antaŭe ĝi nomiĝis ("Uj Harcos"), sed ĝin malpermesis la polico. Do ekagu! Adr.: "Fáklya" 33, rue de la Grange-aux-Belles, *Paris-X.,* Francio.

La komitato por internacia korespondo

ĉe la ĵurnalo "Smiĉka", *Volsk,* USSR, kunligas por serioza korespondado ĉiulandajn laboristajn organizojn kaj labkorojn kun Volskaj laborejoj, fabrikoj k labkor-grupoj. Adr.: *Volsk,* Voljskij kraj. USSR. Do vostrebovanija al Semen Kirjanov.

40 ĉiuspecaj kooperativ-oficistoj

deziras korespondadi kĉl pri IRH-movado, politiko, ekonomio, agronomio ktp. Usonanoj, skribu pri kotonkulturado. Respondon garantias SAT-ano 6771. Adr.: USSR, Turkmenio, *Aŝhabad,* Stavropolskaja 22.

20 gelaboristoj

volas korespondi kun ĉiulandaj laboristoj, ĉefe vitrolaboristoj, pri ĉiuj labor. temoj. Interŝ.: PI, PK, ilustr. gazet., esperantaĵojn. — Korespondproponojn sendu al K-do Ĉerniajev J. (14 948), *Konstantinovka,* Artemovskij okrug, poŝtkesto 37. Nepra k tuja respondo estas garantiata!

Du junuloj filatelistoj

Kevlin S. k Kozaĉenko V. dez. interŝ. PM, PK, PI, bfl, ilustr. gaz. kĉl, prec. kun Azio k Usono. Resp. gar. k. nepra. Adr.: USSR, Ukraino, *Nikolaev,* Rybnaja 43. Al K-do S. J. Kevlin.

Redakcio de radio-gazetoj de Odesa Radio-Centro invitas proletojn el ĉ. l. skribi al red. pri klasbatalo, lab. k kamparana vivo, kondiĉoj de laboro, IRH, militdanĝero ktp. La ricevotan materialon la red. disaŭdigos. Skribu ankaŭ, kion vi dez. aŭskulti: kiujn deklamojn, kantojn esp-lingvajn, muzikaĵojn ktp. Sovetianoj rajtas sendi al Radio-Centro neafrankitajn let. Resp. gar. Adr.: USSR, *Odeso,* Lenina str. 17. Radio-Centro.

Gekamaradoj tutmondaj!

Por la 1-a maja festo sendu amase salutleterojn al Nikolaeva revolucia laboristaro. — Adr.: Ukrainio, *Nikolaev,* Zavod "A Marti". Esperanto.

ENHAVO:

	pago
La homo kaj la maŝino	325—327
Kanado — lando de ora oportuno	327
El usona taglibro	327
Rezulto de ĝenerala elektado en Japanio	327—328
La laboro en la silkfabrikoj (Belgio)	328—329
Baptofesto	328
Ŭestminster — Londono . . .	329
Diskutejo	329
Esperanto-Servo	330
Sennaciula Virina Paĝo . . .	331
Tra Esperantio	332—334
Anoncoj	334

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)